

22



andrzej pettyn

**skizo
pri la esperanto
movado
en pollando**

pola esperanto-asocio
varsovio 1978

La unua periodo

Pollando estas la unusola lando, en kiu Esperanto havas sian praperiodon. Tiu praperiodo komenciĝis la 17-an de decembro de la 1878 jaro en Varsovio, kiam la juna Ludoviko Zamenhof kun siaj gimnaziaj kolegoj festis "la ekvivigon de la lingvo" nomita "Lingwe Uniwersala". Tiu praperiodo - en kiu Zamenhof ellaboris cetera kelkajn variantojn de sia lingvo - daŭris ĝis la 26-a de julio de la 1887 jaro, kiam en Varsovio aperis la "Unua libro" de Doktoro Esperanto, sub kiu pseudonimo li publikigis sian definitivan projekton de l'lingvo internacia.

Unue en Varsovio kaj poste ankaŭ en aliaj urboj de la pollanda teritorio tiutempe dispartigita kaj aneksita de Aŭstrio, Prusio kaj Rusio aperis la unuaj adeptoj de la nova lingvo internacia. Inter ĉi tiuj unuaj adeptoj troviĝis Antoni Grabowski, kiu kiel la unua interparolis kun Zamenhof en la nova lingvo; same entuziasma adepto de la zamenhova lingvo fariĝis pola poeto Leo Belmont. La du menciitoj ellernis la lingvon ankoraŭ en 1887 tuj post la apero de la "Unua libro", sed baldaŭ aliĝis aliaj: statistikisto kaj etnografo Adam Zakrzewski, ĵurnalisto kaj bibliotekisto - Aleksander Brzostowski, ĵurnalisto Józef Waśniewski, kuracisto d-ro Wilhelm Róbin kaj ili fariĝis kerno de la estonta organizita movado.

Pollando tiutempe, kiel dirite, ne estis sendependa ŝtato kaj ekz. en la landparto troviĝanta sub la cara jugo ne estis facile ricevi la permeson fondi organizaĵon, ĉar tuj oni suspektus, ke tiamaniere oni volas kaŝe disvolvi kontraŭcarisman agadon. Sed tamen jam la 1-an de decembro de la 1893 jaro oni fondis en Varsovio la unuan nelegalan esperantistan grupon. La fonda kunveno, okazis en la loĝejo de studento St. Goldberg. Tiun historian kunvenon partoprenis kvin personoj: J. Janowski, d-ro J. Waśniewski, d-ro W. Róbin, Al. Blumental /la frato de Leo Belmont/ kaj la menciita St. Golberg. Zamenhof ne loĝis tiutempe en Varsovio, sed en Grodno kaj la grupo sendis al li siajn salutojn. La unua grupo kunvenis pli aŭ malpli regule.

Baldaŭ poste al la renkontiĝoj en privataj loĝejoj aldoniĝis tiuj en kafejoj. Post la reveno al Varsovio partoprenis ilin ankaŭ D-ro L. Zamenhof kune kun la edzino kaj siaj fratoj. La renkontiĝojn i.a. partoprenis ankaŭ fratoj Emilian kaj Jerzy Loth.

Tamen la varsoviaj esperantistoj finfine trovis vojon al la legala agado kaj sukcesis fondi la unuan polan esperantistan organizaĵon, kies nomo estis Varsovia Societo Esperantista kaj kiu povis fondiĝi nur dank' al tio, ke ĝi fariĝis filio de la Societo "Espero" en Petersburgo. La fondo okazis la 6-an de decembro de la 1904-a jaro. La prezidanto de la Societo fariĝis Antoni Grabowski, vicprezidanto Leo Belmont, sekretario Kabe /d-ro Kazimierz Bein/ kaj bibliotekisto Aleksander Brzostowski. Jam post unujara agado la membronombro de la Societo egaligis al 70, kion oni povas konsideri vera sukceso. Oni komencis disvolvi viglan agadon kaj en 1908 oni memstarigis la organizaĵon fondante Polan Esperantistan Societon, kio aliflanke ebligis fondadon de filioj sur la tuta teritorio de la landparto aneksita de Rusujo.

Intertempe en la suda parto de nia lando, t.n. Galicio, aneksita de Austrio, la unuaj grupoj esperantistaj fondiĝis en 1906 en Krakovo kaj Lvovo. La agadkondiĉoj estis en tiu landparto pli favoraj, ne estas do mirige, ke jam en 1906 en Lvovo komencis aperadi la revuo "Pola Esperantisto", unue kiel organo de la tica Societo "Esperanto" kaj poste - kiam la politikaj kondiĉoj rezulte de la revolucio en 1905 iom mildiĝis - kaj post la translokigo de la redakto en 1908 en Varsovion - kiel organo de la tuta pola esperantistaro.

Ĝis la unua mondmilito la esperantista agado sur la pollanda teritorio ĉefe koncentriĝis en la landpartoj regataj de rusoj kaj aŭstroj. En la landparto tiutempe apartenanta al Prusujo la polaj esperantistoj disvolvis malpli viglan agadon.

En la 1912-a jaro okazis en Krakovo la 12-a Universala Kongreso de Esperanto, organizita en kunligo kun la 25-jara datreveno de la apero de la "Unua libro". Partoprenis ĝin 1000 esperantistoj el la tuta mondo. La vasta informado kaj la riĉa kultura programo /i.a. oni enscenigis la tutan operon "Halka" de St. Moniuszko en la traduko de A. Grabowski/ multe kontribuis al la posta disvastiĝo de la lingvo sur la tuta pollanda teritorio, sed precipe en Krakovo, kiu iom-post-iom fariĝis grava

esperantista centro.

Post la unua mondmilito, en la liberigita Pollando, la organizita movado esperantista unue renaskiĝis en Krakovo, ĉar jam en la 1917-a jaro. Unu jaron pli poste /1918/ la krakovanoj komencis eldonadi sian propran gazeton "Esperantista Voĉo", kiun redaktis S. Grenkamp Kornfeld. Per siaj revuo kaj iniciatoj la krakovanoj helpis ankaŭ /en 1918/ restarigi la movadon en Varsovio.

Intertempe la pola esperantistaro suferis dolorigan baton. Post la longedaŭra malsano, la 14-an de aprilo 1917, mortis en Varsovio la kreinto de Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof. Lia fidela kamarado, Antoni Grabowski, faris ĉe lia tombo la adiaŭan esperant-lingvan paroladon. Sed kelkajn jarojn pli poste, la 4-an de julio de la 1921-a jaro rezulte de surstrata koratako forpasis ankaŭ Grabowski.

La intermilita periodo

La movado en la intermilita periodo ricevis iom pli favorajn evolukondiĉojn al antaŭe. En 1922 oni organizis la unuan Tutpolan Esperanto-Kongreson en Lodzo, kiu konsiderinde antaŭenpuŝis la movadon. Intertempe en 1919 en Varsovio, fondiĝis la unua laborista klasbatala societo esperantista "Laboro", kiu disvolvis rimarkindan agadon speciale en la eldona kaj kulturkleriga sferoj. Sed la progresema programo de la Societo ne plaĉis al la tiamaj burĝaj aŭtoritatoj, kiuj decidis likvidi ĝin kaj kelkajn gvidantojn eĉ malliberigis.

En 1923 fondiĝis en Varsovio AERO /Akademia Esperantista Rondo/ kaj aliaj societoj kaj grupoj kaj iom-post-iom la movado ĉiam pli dispartiĝis. Ĉio ĉi kaŭzis, ke en 1926 oni decidis unuigi ĝin per la fondo de unu organizaĵo, kiu ricevis la nomon Pola E-Delegitaro.

En 1926, la 16-an de aprilo, oni solene malkovris la monumenton sur la tombo de Zamenhof, samjare en Bjalistoko kaj Lodzo oni inaŭguris la unuajn Zamenhof-stratojn. En 1926 Krakovo fariĝis konstanta sidejo de PED kaj ĝia organo fariĝis "Pola Esperantisto", kies redakto ankaŭ transiris en Krakovon.

La revuon redaktis tiutempe la konata sciencisto kaj esperantisto prof. Odo Bujwid kaj mag. Tadeusz Hodakowski.

En la 1927 jaro post la Universala Kongreso en Gdansko okazis impona Postkongreso en Varsovio.

En 1928, la 15-an de decembro, Pola Radio el Varsovio aŭdigis la unuan esperantlingvan paroladon de Wiesenfeld. Similajn paroladojn okaze de la naskiĝdatrevenoj de Zamenhof oni faris poste ĉiujare. Kaj en 1934 Pola Radio komencis disaŭdigi regulajn esperantlingvajn programojn en sia eksterlanda servo.

En 1930 en Lodzo okazis la IV Tutpola Esperanto-Kongreso, dum kiu i.a. sekvis leĝigo de la Pola Instituto de Esperanto, cetero iniciatita en 1922.

En 1931 la Universala Kongreso okazis en Krakovo kaj sekvis ĝin du postkongresoj - en Varsovio, kie i.a. oni malkovris memortabulon sur la domo, en kiu iam loĝis Zamenhof ĉe la strato Zamenhofa 9, kaj la dua - en Bjalistoko, kie i.a. oni malkovris monumenton al Zamenhof.

En la 1939-an jaron la pola esperantistaro eniris kun kunsiderinda atingaro: pli ol 40 grupoj, centoj da kursoj /speciale famiĝis la lernolibroj de M.Sygnarski/ oftaj prelegoj kaj samtempe oftaj kaj favoraj artikoloj en la pollingva gazetaro, vigla librooldonado /i.a. aperis "Quo Vadis" de H.Sienkiewicz en la traduko de Lidia Zamenhof/, sciencaj publikaĵoj /i.a. "Kvin prelegoj pri bakterioj" de prof. O.Bujwid "Estetiko en medicino" de K.Swięcicki/, prestiĝo ĉe la socio kaj speciale ĉe literaturistoj /kelkaj el ili, i.a. Julian Tuwim, mem estis esperantistoj/ - ĉio ĉi la 1-an de septembro de la 1939 jaro perdis sian ekzistoscenon. Kaj la 25-an de septembro 1939 ĉesis ekzisti la loĝejo de Zamenhof ĉe la strato Królewska 41, nenigita de hitlera disrompa bombo kune kun la manuskriptoj kaj memoraĵoj post Zamenhof. Lian filon, Adam, la hitleranoj pafmortigis la 29-an de januaro 1940 en la apudvarsovia loko Palmiry. En 1942 hitleranoj gasumis en Treblinka la filinojn de Ludoviko Zamenhof - Lidia kaj Zofia kaj lian fratino - Ida Zimmermann. Simila sorto trafis multajn elstarajn polajn kaj juddovenajn esperantistojn. En la varsovia getto pereis i.a. la konata literaturisto, amiko de Zamenhof - Leo Belmont /Leopold Blumental/, ĉefdelegito de UEA por Pollando - Jakobo Shapiro. La konatan aŭtoron de lernolibroj - Leopold Dreher

/Leo Turno/, hitleranoj murdis en Lvovo. En hitlera koncentrejo pereis ĵurnalisto Edward Wiesenfeld. Por longa tempo de la hitlera okupacio kaj dua mondmilito Esperanto ĉesis ekzisti. Nur malmultaj kuraĝuloj, kiel ekzemple prof. Mieczysław Sygnarski /i.a. tradukante "Tra dezerto kaj praarbaro" de H. Sienkiewicz - ĵus eldonis ĝin HdE kaj PEA/ daŭrigis sekrete la agadon. Inter ili eksterordinara kuraĝulo estis Albin Makowski, kiu instruis Esperanton en la koncentrejo Stuthoff kaj eĉ verkis tie lernolibron, kiun jam postmilito ekspoziciis la Varsovia Historia Muzeo.

Post la dua mondmilito

Jam en la 1944 jaro en la liberigita Lublino ekagis la unua grupo esperantisto, kies spriritforto estis red. Jan Zawada. La 18-an de marto 1945 fondiĝis E-grupo en Krakovo, kiu post la kontaktiĝo kun gesamideanoj en Varsovio kaj Lodzo decidis fondi centran organizaĵon. La aŭtoritatoj donis sian permeson por tio /laŭ "Pola Esperantisto" el 1946/ la 17-an de novembro 1945. Oni elektis provizoran ĉefan estraron, kies prezidanto fariĝis J. Alfus, vicprezidantoj J. Hećko kaj J. Silhan, ĝen. sekretario - L. Kuczer, sekretario A. Piotrowski. Oni komencis tuj fondi lokajn grupojn, i.a. en Szopienice kaj Pruszcz Gdański.

La unua tutpollanda E-kongreso post la dua mondmilito okazis la 9-an kaj 10-an de junio 1946 en Lodzo. Alvenis preskaŭ ĉiuj, kiuj sukcesis transvivi, kaj inter ili pioniro de nia pola E-movado, advokato Roman Sakowicz, bofilino de Ludoviko Zamenhof - Wanda Zamenhof, red. Jan Zawada, d-ro Antoni Czubryński, red. Bolesław Monkiewicz, mag. Isaj Dratwer. Ĉi-lastata elstara E-aganto en "Pola Esperantisto" n-ro 2-3/1946 skribis pri la kongreso i.a. la jenon:

"Kaj nuna kongreso aŭ pli ĝuste konferenco estis duoble por mi grava. Unue, por mi, preskaŭ mirakle savinta el la ungegoj de germanaj murdistoj, ĝi montris al mi, ke la plej turura kataklismo ne povis pereigi nian movadon kaj due ni bone sciis, ke ne partoprenis ĝin kaj jam nenian kongreson, tiuj multnombraj amikoj, kunlaborantoj, kun kiuj tiom ofte mi diskutis, babiladis, verĉis kaj iafoje kun kelkaj eĉ flirtis /kompreneble temas pri

samideaninoj./. Jes, la senkompara germana furiozo forigis ilin ĉiujn kun milionoj da senkulpaj homaj vivoj..."

Unu el la plej memorindaj solenaĵoj de ĉi tiu unua kongreso postmilita estis reenmurigo de memortabulo ĉe la strato Zamenhofa. La memortabulon oni enmurigis en 1930 kaj dum la okupacio la germanaj faŝistoj forigis ĝin kaj uzis kiel pavimŝtonon. Post la milito oni hazarde retrovis ĝin.

Okazis la unua tutpollanda kunsido de la delegitoj de la Asocio de Esperantistoj en Pollando /tian nomon havis tiutempe la nuna Pola Esperanto-Asocio/ kaj oni elektis novan estraron, kies prezidanto denove fariĝis J. Alfus. Tamen unu jaron pli poste la sidejon de AEP oni translokigis el Krakovo en Varsovion kaj kiel prezidanton oni elektis Jan Zawada.

Pli-malpli ĝis la 1954-a jaro daŭris la rekonstruado de la pola E-movado post la damaĝoj kaŭzitaj de la milito. En tiu tempo la movado koncentriĝis ĉefe en Varsovio kaj Vroclavo. En la jaroj 1954-1959 la E-movado komencis konstante evolui. En tiu tempo polaj ŝtataj eldonejoj aperigis en E-o plurajn valorajn verkojn, vastiĝis la instruado de la lingvo. Sendube la kulmino de la evoluo en tiu periodo estis la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en 1959, kiu sub la alta protektado de la pola ĉefministro okazis en la pola ĉefurbo Varsovio.

La periodon post la 1959 jaro karakterizas ĉiam pli vasta utiligado de la lingvo en kultur-kleriga kaj turisma sferoj, kion ebligis plifirmiĝo de la organiza strukturo de PEA /jam pli frue en 1958 oni revenis al la nomo: Pola Esperanto-Asocio/, plivastiĝo de la reto de lokaj grupoj kaj apogo de la esperantista agado fare de diversŝtupaj aŭtoritatoj. Aparte menciinda estas la utiligo de la lingvo por la informado pri Pollando, en kiu kampo unuarangan rolon ludas la esperantlingvaj elsendoj de la Pola Radio, inaŭguritaj la 4-an de aprilo 1959 /ni tamen menciuj, ke en la jaroj 1946-1949 Pola Radio disaŭdigis esperantilingvajn informojn pri Pollando unufoje en la semajno/. En 1978 la E-elsendoj de la Pola Radio estas aŭdigataj eĉ tri fojojn tage kaj ĝuas internacian prestiĝon en la tuta Eŭropo. En 1970 Universala Esperanto-Asocio rekone pro la "evoluiĝo de la ĵurnalisma lingvaĵo" - atribuis al la E-Redakcio de la Pola Radio specialan premion en la formo de "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto".

Ĉi-koncernan rekon-dokumenton subskribis la tiamaj: prezidanto de UEA, prof. I. Lapenna kaj ĝenerala sekretario G. Becker.

Apartaĵn sukcesojn oni notas en la teatra sfero. Polaj geaktoroj tre ofte prezentas teatraĵojn esperantlingve.

Elz. Jadwiga Gibczyńska prezentis siajn monodramojn eĉ en la fora Japanujo, Karina Waśkiewicz estis aplaudata dum pluraj E-arangoj kaj universalaj kongresoj. Same grandajn sukcesojn atingis Andrzej Tomecki, kiu la programon "Kaj tamen estas Varsovio" prezentis en pli ol 10 landoj. Grandan sukceson atingis la Lodza Teatr Powszechny per la esperantlingva enscenigo de "Kataki signifas malamiko" de S. Wincelberg.

Plurfoje prezentis siajn recitalojn en E-o kantistino Danuta Alczewska-Klus, kiu i.a. enscenigis la korskuan monodramon de Alina Nowak "Oratorio de Auschwitz" pri la martireco de infanoj en la iama hitlera koncentrejo Auschwitz-Birkenau.

En 1971 fondiĝis Pola Esperanto-Teatro je la nomo de Antoni Grabowski, kies geaktoroj Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzyński enscenigis kaj prezentis en multaj landoj, i.a. en Usono, Islando, FRG, Hispanujo, Belgujo, Aŭstrio, Hungario, Jugoslavio, GDR, Luksemburgio la teatraĵon "Proksima nekonato" de Aleksander Ścibor-Rylski kaj krome "La hipnoto" de Antoni Cwojdzinski. La Pola Esperanto-Teatro konsiderinde kontribuas al la plifirmigo de la pozicio de Esperanto en teatro kaj al la popularigo de la internacia lingvo.

Aparta ĉapitro de la sukcesoj en la teatra sfero estas prezentadoj de polaj pupteatroj. De pli ol 10 jaroj polaj pupteatroj atingas sukcesojn en la pupteatraj festivaloj en Zagrebo. Inter la teatroj enscenigintaj E-teatraĵojn troviĝas la Krakova Pup-Teatro "Groteska", la lodza "Pinokio", la bielska "Banialuka", la poznana "Mazcinek". Ĉi-lasta en 1971 akiris en Zagreb la unuan premion kaj sekve partoprenis turneon tra Danlando laŭ la invito de la tiea edukministerio, prezentante sian esperantlingvan pup-teatraĵon en diversaj urboj de Danlando. En 1977 la teatro "Kacperek" el Rzeszów ankaŭ akiris la ĉefpremion dum la menciita festivalo pro la teatraĵo "La princo de Portugalio".

En la lastaj jaroj /1977/ interesan enscenigon de la teatraĵo "Rakonto pri libereco" faris la teatro "Rondo" el Siupsk. Notinda estas ankaŭ la unua en Pollando teatraĵ-enscenigo en la formo luno kaj sono. Temas pri la "Poemo pri princo Eriko", prezentita en 1977 en la malnova kastelo de Darłowo.

Fine ni substreku, ke ĉiam pli altan rekonon inter la diverslandaj esperantistoj akiras kantistino Bożena Zborowska el Koszalin pro la altnivela kantarto kaj bonegaj kanto-tekstoj.

Se mi jam menciis pri kantado, mi aldonu, ke en Pollando ekzistas diversaj kant- kaj muzik-grupoj kaj eĉ junularaj orkestroj, en kies repertuaro troviĝas multe da E-kanzonoj. La plej konata el ili "Muzilo" el Vroclavo aperigis eĉ siatempe propran 4-kantan diskon. Ankaŭ la kvarteto de la Pola Radio "Beltono" kaj baritonkantisto Remigiusz Kossakowski regule koncertas en E-o.

Valoras substreki, ke en la lastaj jaroj la ideo de 1^a lingvo internacia interesigis elstarajn polajn komponistojn. Ekz. prof. Henryk Jabłoński dediĉis al ĝi simfonian muzikverkon "La stelo de 1^a espero" kaj Andrzej Koszewski, mondfama komponisto de korus-kantoj, komponis kanton "La espero" laŭ la vortoj de L. Zamenhof, kiun kanton kadre de la IX Festivalo de la Nuntempa Muziko "Varsovia Autuno" plenumis la Koruso de la Nacia Filharmonio en Varsovio.

Feriadoj, tendaroj, seminarioj

Ĉiujare oni organizas en Pollando multe da E-arangoj, inter kiuj parto estas internacikarakteraj. En septembro 1978 jam la 14-an fojon okazos la Internacia Feriado Esperantista en Międzygórze. En la jaroj 1971-1975 altan rekonon kaj internacian prestiĝon ĝuis la feriadoj en Międzyzdroje, kiuj estis organizataj de la turisma oficejo "Gromada" kaj filio de PEA en Szczecin. De jaro al jaro plifirmiĝas la bona reputacio de la okazanta en majo Ĉebalta Esperanta Printempo en Międzyzdroje, kiun lorte organizas la tre vigla filio de PEA en Koszalin. La II Printempo estis ĉefparte dediĉita al la literatura laboro de D-ro Kazimierz Bein /Kabe/, la III - al la akcepto de la E-traduko de "Sinjoro Tadeo" en la mondo, en kunligo kun la 60-a datre-

veno de la apero de la unua eldono de la E-traduko de ĉi tiu verko.

La plej grandajn atingojn en la turisma sfero notas tamen la esperantistoj de Bydgoszcz. Tie ĝuste troviĝas la sidejo de la Centro de Esperanto-Turismo de PEA kaj de la vojevodio filio de la vojaĝoficejo "Juventur", kiu de jaroj en kunlaboro kun Monda Turismo vaste aplikas Esperanton en la turisma kampo. /Centro de Esperanto-Turismo, 85-094 Bydgoszcz, str. Marii Skłodowskiej-Curie 10/.

Junularo

La junularo disvolvas sian E-agadon kadre de PEA - pere de junularaj rondoj kaj ekster PEA - ĉefparte en la Socialisma Asocio de Polaj Studentoj /SAPS/. En 1959 okazis en Gdansko la 15-an Kongreso de TEJO. Simila kongreso okazis en 1972 en Toruń.

La junularo specialan atenton dediĉas al la utiligo de E-o por scienca agado. Jam dek internaciaj studentaj sciencaj seminarioj okazis en la Universitato de Mikolaj Kopernik en Toruń. Apartan popularecon ĝuas la interlingvistikaj seminarioj de SAPS. En 1978 la junularo de PEA elpaŝis kun la iniciato organizi internacian laborbrigadon esperantistan, kiu laborus ĉe la konstruado de la Samcentro por Infanoj.

La instruado de Esperanto

En la jaroj 1959-1978 oni organizas ĉiujare ĉ. 100 kursoj por plenkreskuloj. Laŭ la statistiko el 1970 E-o estis instruata kiel nedeviga lernobjekto en 109 diversgradaj lernejoj kaj eksterlernejoj kaj junularaj edukejoj. En lernejoj kaj junularaj edukejoj oni instruas la lingvon laŭ la instruprogramo aprobita de la Ministerio pri Edukado /en 1967/.

La instruprogramo konstatas i.a., ke "La instruado de Esperanto havas grandan signifon en la nuntempa mondo. La nuna evoluo de la internaciaj rilatoj postulas multe da personaj kaj korespondaj kontaktoj, en kiuj ĉiam pli ofte oni utiligas Esperanton. La instruado de Esperanto kontribuas al la edukado de junularo en la spirito de humanismo kaj internaciismo, profundigas la interesigon pri la nuntempa mondo, vekas la ambicion ellerni

aliajn fremdajn lingvojn".

La instruadon de Esperanto en lernejoj kaj junularoj eduk-kejoj ĉefparte oni traktas ĉiel unu el la formoj de la interna-ciisma edukado. Similan rolon plenumas la instruado de tiu lin-gvo en la harceraj /skolta/ grupoj de la Asocio de Polaj Harce-roj, kiu Asocio i.a. aprobis la kapablotitolon de "Esperantisto". Interesajn eduk-rezultojn atingis ankaŭ la Palaco de Junularo en Szczecin, kie de dekelkaj jaroj estas gvidata Esperanto-la-borejo. Al s-ino Stefania Palica - la iniciatintino de la utili-go de E-o en la Palaco kaj tiea longjara instruistino de la lingvo - la edukinstancoj de Szczecin atribuis multe da premioj kaj distingoj, rekone pro ŝia tre konkreta kaj valora eduklaboro en la junulara medio. Similan rekonon ricevis edukisto de la Ŝtata Orfodomo en Gdańsk-Orunia, Henryk Kozaczuk, kiu ankaŭ uti-ligis Esperanton en sia eduka laboro. Rekone pro liaj meritoj on tiu sfero la socio de la Marborda Gdańska Regiono atribuis al li la honoran titolon "Gdanskano de la 1967 jaro". La inter-naciajn ekspoziciojn de infandesegnaĵoj, kiuj estis organizitaj de la junaj esperantistoj el la Ŝtata Orfodomo en Gdańsk-Orunia, vizitis ĉ. 100 mil personoj, kaj la tiea edukado per internacia kunlaboro estis ekzemplo de la edukado por la paco...

La polaj atingoj en la elprofitado de Esperanto por la edukado de la junularo estis akceptitaj kun granda interesiĝo dum la tutmonda konferenco de la pedagogia movado de Freneit en Plock /1976/, en Pollando, kiun konferencon ĉi tiu movado organizis kunlabore kun la pola Ministerio pri la Klerigo kaj Edukado kaj Instituto pri la Pedagogia Kapabligado de Instruistoj.

En dekelkaj polaj altlernejoj kaj universitatoj oni orga-nizas nedevigajn lektoratojn aŭ kursojn de Esperanto por stu-dentoj kaj sciencaj laborantoj. Kursojn por plenkreskuloj oni organizas en ĉiuj iom grandaj urboj kaj urbetoj de la tuta lan-do. En la lastaj jaroj kreskantan popularecon ĝuas la korespon-daj kursoj, kiujn gvidas la Ĉefa Estraro de PEA kaj kiujn ĉiu-jare partoprenas de 3 ĝis 6 mil personojn.

Kunlaboro kun eksterlando

Tiu agadsfero ĉiam pli vastiĝas kaj tute aparte rimarkinda estas la kunlaboro kun la diverslandaj Polaj Kultur-Institutoj, kiuj pli kaj pli proksime kunlaboras kun esperantistaj organizaĵoj sekvante la praktikan valoron de Esperanto. Oni organizas komunajn kulturajn aranĝojn kun la partopreno de polaj aktoroj kaj kanzonistoj, kiuj prezentas siajn programojn en E-o. Menciindas la agado en Vieno, Bratislavo, Budapeŝto, Sofio, Prago, Berlino, Lepsiko, Verono k.a. urboj eŭropaj.

Al la plej interesaj en la lastaj jaroj apartenis la kultur-vesperoj en la Pola Legejo en Vieno /i.a. Andrzej Tomecki prezentis tie sian spektaklon "Kaj tamen estas Varsovio" en 1970, kaj la Pola Esperanto-Teatro "Proksiman nekonaton" en 1977/.

En la sidejo de la Pola Kultur-Centro en Berlino /GDR/ okazis en 1972 recitalo de Danuta Alczewska-Klus, unu jaron pli poste koncertis tie A. Tomecki kaj en 1977 la Pola Esperanto-Teatro. En la sidejo de la Pola Kultur-Centro en Budapeŝto aktorin Jadwiga Gibczyńska, Pola E-Teatro; kaj en la Kultur-Centro en Sofio oni organizis projekciadon de polaj E-filmoj en kunligo kun libroekspozicio.

En 1971 PEA subskribis kunlaborkontrakton kun Hungara Esperanto-Asocio, en kies kadro oni interŝanĝas spertojn, oni organizas komunajn aranĝojn ktp. Similan kunlaborkontrakton PEA subskribis kun la Centra Laborrondo Esperanto en GDR /en 1975/. Ĉi-lastata kunlaboro tutspeciala efikas sur loka ŝtupo per la disvolvado de kunlaboro inter ekz. Koszalin kaj Neubrandenburg kaj Szczecin-Rostock. Kadre de ĉi tiu kunlaboro polaj geinstruistoj Stefania Palica, Elwira Twardowska kaj Andrzej Pettyn gvidis sukcesajn E-kursojn en GDR kaj la esperantistoj de GDR feris en la E-libertempadoj en Międzygórze, Międzyzdroje kaj Mielno.

La kunlaboro kun la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj koncentriĝas ĉefparte sur la interŝanĝo de spertoj kaj kunlaboro kadre de la MEM-Sekcioj. Sovetuniaj E-filmoj, ekz. "Dagestana balado", "La lando, kiun mi amas" k.a. estis projekciataj en multaj polaj urboj kaj la politika kaj beletra literaturo esperantlingva el Sovetunio ĝuas ĉe ni,

en Pollando, meritan popularecon.

La kontaktoj kun Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio kaj aliaj organizaĵoj esperantistaj en socialismaj landoj daŭre evoluas.

Se temas pri la okcidentaj landoj, aparte rimarkinda estas la kunlaboro kun la Esperanto-Asocio de Finlandio. Oni interŝanĝas spertojn, kunlaboras en turisma sfero kaj en tiu de la E-instruado. Estas substrekinde, ke en Pollando kaj Finnlando esperantistoj agas en la amikec-societoj Pollando-Finnlando kaj ankaŭ tie por la kunlaborceloj parte utiligas Esperanton.

Libro-eldonado

En la jaroj 1945-1978 aperis en Pollando ĉ. 250 E-libroj en la suma eldonkvanto de 820 000 ekz./!!!/. Duonon de la eldonkvanto konsistigas lernolibroj kaj vortaroj, la ceteron konsistigas belliteraturo, turismaj gvidlibroj, informlibroj pri Pollando k.a.

La plej grandan popularecon ĝuis la reeldonoj de: "Sinjoro Tadeo" de Adam Mickiewicz, "La Faraono" de Bolesław Prus kaj "Quo Vadis" de Henryk Sienkiewicz.

Valoras substreki, ke krom la menciitaj libroj oni eldonis ankaŭ kelkajn interesajn tradukojn de la verkoj originale skribitaj en Esperanto. Unuavice menciindas la popularscienca verko de prof. Paul Neergaard el Danlando "La vivo de la plantoj" /pollingve: "Życie Roślin"/ kaj "Kun kadavro de l'edzino" de Toyofun Ogura /pollingve: "Zagłada Hiroszimy"/. Ĉi tiuj kaj aliaj tradukoj kontribuis al la plifirmigo de la pozicio de Esperanto kiel lingvo de la originala verkado beletra kaj popularscienca.

----- 000 -----

A T E N T O N !

Jus aperis la delonge atendata romano de Henryk Sienkiewicz "Tra dezerto kaj praarbaro" en la majstra Esperanto-traduko de prof. Mieczysław Sygnarski. 314 paĝoj grandformataj. Prezo 120 zlotoj. Okcidentanoj mondu la verkon ĉe la kuneldoninto "Heroldo de Esperanto", Rue de la ReINETTE/Pippelingstr.13,b.28, B-1000-Bruselo. Ploj mondu ĉin rekte ĉe: Pola Esperanto-Asocio, str. Jasna 6, 00-013 Warszawa, tel.27-97-42.

Ĉi tiu emociplena romano prezentas la aventurojn de 7-jara knabino kaj 14-jara knabo en Afriko fone de la sovaĝa naturo de dezertoj kaj praarbaroj. Pro la internacia stilo /la manuskripton kontrolis germano kaj hungaro/ kaj tre vasta vortprovizo la romano bonege taŭgas por la profundigado de la lingvokono.

Kaptu la unikan ŝancon kaj havigu al vi la verkon, kiu pliriĉigos vian Esperanto-bibliotekon!

